



LA DEKSEPA



Bulletin Mensuel Espérantiste
servi gratuitement aux membres de la Section du XVII^e Arr^t
du Groupe Espérantiste de Paris.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : **H. de COPPET**
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : 1 franc par an. — Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

Groupe Espérantiste de Paris - Section du XVII^e Arrondissement

Al la Esperantistoj ĉeestontaj ĉe la Nacia Franca Kongreso

(Paris, Aprilo 1912)

Karaj Gesamideanoj,

Geĉeestontoj en Paris por la kongreso de la S. F. P. E.
estu la bonvenantoj en nia ĉefurbo !

Niaj amikoj de la Sekcio de la Latina Kvartalo klopodis,
por ke via restado inter ni estu kiel eble plej agrabla ; per vi
mem, vi konstatos la fortecon de nia afero en Paris.

Ni kore petas, ke la kongresanoj, kiuj estos jam en Paris
la merkredon, la 10-an de Aprilo, aŭ ankoraŭ en Paris la 17-an
de Aprilo, nepre vizitu nian Sekcion (Café de la Gare, 6, place
Pereire, Paris ; Métro : *Pereire*) je la naŭa horo vespere. Ili estos
kore akceptataj ; ilin ni malpacience atendas !

Vivu la Fundamento de Esperanto ! Vivu la S. F. P. E. !

Por la Komitato de la Sekcio :

HENRI DE COPPET
Prezidanto.

ROBERT BOLLACK
Sekretario.

Groupe Espérantiste de Paris - Section du XVII^e Arr^t.

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures, Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière. Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

Notre Diner mensuel.

Les prochains Diners mensuels de la Section auront lieu les Mercredis 3 Avril et 1^{er} Mai 1912, à 8 heures précises du soir, Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris.

Prix : fr. 3,25 (boisson et pourboire compris).

Prochaines causeries.

- 3 Avril. — Diner mensuel suivi de jeux espérantistes.
- 10 Avril. — S-ro Henri de Coppet : Pri la Kongreso de Dresden (lumbildoj).
- 17 Avril. — S-ro Nonin : Bruxelles (lumbildoj).
- 24 Avril. — F-ino Talvat : Sens (deveno kaj historio), (lumbildoj).
- 1^{er} Mai. — Diner mensuel suivi de jeux espérantistes.

Le Secrétaire : ROBERT BOLLACK.

Nacia Kongreso de la S. F. P. E.

Nia nacia Kongreso de la S. F. P. E. okazos en Paris, sabaton la 13-an de Aprilo 1912, je la naŭa matene ; se necese, dua kunsido okazos posttagmeze. Okazos, sabaton vespere, teatra prezentado, Salle des Horticulteurs, 84, rue de Grenelle ; dimanĉon la 14-an matene, estos organizataj promenadoj en Paris, kaj je tagmezo okazos festeno, en Palais d'Orléans, 200, avenue de Maine (1).

Grandan, plenan sukceson ni, kompreneble, deziras al tiu Kongreso.

(1) Por ĉiuj aliaj sciigoj sin turni al la sekretario de la Organiza Komitato (S-ro Zigler, 25, rue des Blancs-Manteaux, Paris IV^e).

Propaganda Festo de la “Dek-Sepa”.

La Redakcio de la « Dek-Sepa » decidis organizi, kun la helpo de la « Zamenhofa Artista Adeptaro », propagandan feston esperantistan, kiu okazos London, la **15-an de Aprilo**, vespere, je la 8-a kaj duono, en la privata hotelo de l'*Institut d'Art*, 4, rue Demours (17^e). (Metro-stacio : Les Ternes aŭ Pereire.)

Ni esperas, ke la kongresanoj de la S. F. P. E., kiuj certe estos ankoraŭ en Parizo je tiu tago, bonvolos ĉeesti tiun propagandan feston, en kiu nur plej pura, fundamenta Esperanto estos parolata, ludata kaj kantata.

Unika prezo de ĉiuj sidlokoj : **Fr. 1.**

Du Festoj fundamente-esperantistaj.

La 27-an de Februaro okazis, ĉe la Grupo Esperantista de Montmartre (Verda Stelo, 129, rue Marcadet, Paris, 18^e), tute interesa parolado de S-ro V. Polgar, Lingvakomitatano, pri « Nia Himno » *Espero*. S-roj H. de Coppet, Em. Robert, G. Grosset kantis la diversajn ariojn de nia himno kaj ĉiuj estis multe aplaŭdataj. La prezidanto de la Verda Stelo, S-ro Marcel Sembat, deputato, estis malhelpata en la ĉeesto; la kunvenon prezidis S-ro Cart, kunhelpata de D-ro Noël, membroj de la Komitato de l' Verda Stelo. La ĉeestantaro konsistis el 200 personoj ĉirkaŭe. La esperantista gazetaro estis reprezentata per S-ro Houbart (*La Movado*), S-ro Frechas (*Le Monde Espérantiste*), S-ro de Coppet (*La Dek-Sepa*).

Multaj el ni ne konis la historion de nia himno, kaj estas tre dezirinde, ke S-ro V. Polgar presigu sian interesan, riĉe dokumentitan paroladon.

*
* *

La 4-an de Marto okazis en Creil la unua festo de la jus fondita Grupo Esperantista.

Post akcepto en la urbdomo ni ĝuis agrablan koncerton. Tiu festo estas la rezultato de la klopodoj de l' grupo de Creil,

de l'Harmonie municipale de Creil (gvidanto : S-ro Dupaquier), de l'Estudiantina Creilloise (gvidantoj : S-roj Robert kaj Delamarre) kaj de la Zamenhofa Artista Adeptaro (Reĝisoro : S-ro Devjatnin).

Ĉe la vespermanĝo ĉeestis S-roj Heuzé, deputato de l'Oise, Darcaigne, urbestro, kaj multaj esperantistoj.

Tiu festo estis intereseĝa :

1-e, ĉar la grupo post tri monatoj da ekzistado certigis la ĉeestantaron pri sia vigleco ;

2-e, ĉar oni multfoje parolis dum tiu tago pri la fideleco al la Fundamento. S-ro Maurice Michon, prezidanto de la Grupo, per emociplenaj vortoj certigis la ĉeestantaron pri la fideleco de la grupanoj al la Fundamento : oni sentis, ke liaj vortoj ja ne estis alvokoj ridindaj aŭ bruegaj, sed la krio de lia lojala konscienco. Vere, je tiu momento, ni ĉiuj estis korduŝitaj, kaj je la fino de lia parolado meritatajn aplaŭdojn ricevis nia bona samideano ;

3-e, ĉar la Komitato de la S. F. P. E. estis reprezentata (S-ro Rollet de l'Isle, prezidanto, S-ro Th. Cart, vicprezidanto, kaj S-ro Demarcy, sekretario, ĉeestis la feston de tiu vigla grupo).

* * *

Do, du bonaj kuraĝigaj festoj okazis : ĉe Verda Stelo ni aŭdis paroladon de S-ro V. Polgar en pure fundamenta lingvo Esperanto ; ĉe la Grupo de Creil ni rimarkis en la koncerta ĉambro banderolon, sur kiu oni legis :

FIDELECO - FUNDAMENTO - ESPERANTO.

Fundamentistoj, antaŭen ! respektante nian lingvon, ni ĝin respektigas.

ROBERT BOLLACK.

SE VI SUFERAS pri la STOMAKO aŭ la INTESTOJ, ne hezitu unu minuton provi la

MAYA BULGARE

Bulgara Lakta Kazeaĵo, kaj vi neniam plu suferos.

Informoj estas riceveblaj de la Societo
Maya Bulgare, 332, rue St-Honoré, Paris. Téléphone 214-40.



MEMORINDAJ DATOJ

pri la Sekcio de la DEK-SEPA Kvartalaro
de la Grupo Esperantista de Paris.

- Oktobro 1902.** — Malfermo de la kurso de S-ro de Coppet, en la Lernejo de la strato St-Ferdinand, Paris, 17-a kv.
- 1902 - 1908.** — La lernantoj de S-ro de Coppet kaj ilia profesoro amike kunvenadas en *Café des Entrepreneurs*. Neniu Societo « oficiala ». Neniu kotizajo. (Benata periodo !)
- 26. de Oktobro 1908.** — La kunvenantoj de la *Café des Entrepreneurs* iĝas Sekcianoj de la Grupo Esperantista de Paris. Ĝenerala fondiĝa kunveno de la Sekcio, *Café de la Gare*, 6, place Pereire. La Sekcio aliĝas al la Federacio Esperantista de la Paris'a Regiono.
- 20. de Majo 1909.** — *Ekskurso de la Sekcio en *Lyons-la-Forêt*.
- 18. de Julio 1909.** — Ekskurso de la Sekcio en *Fontainebleau*.
- 6. de Oktobro 1909.** — Unua amika vespermango monata.
- 14. de Oktobro 1909.** — Ĝenerala jara kunveno de la Sekcio.
- 29. de Majo 1910.** — Ekskurso de la Sekcio en *Sens*.
- 19. de Oktobro 1910.** — Ĝenerala jara kunveno de la Sekcio. Tiu ĉi, por esti neŭtrala inter la « Unuiĝo de la Federacioj » kaj la S. F. P. E., eksigis el la Federacio Esperantista de la Paris'a Regiono.
- 20. de Novembro 1910.** — Festo de la Sekcio en *Salle Berlioz*. Dum tiu ĉi festo estis disdonata la unua numero de « La Dek-Sepa », monata organo, senpage sendata al ĉiuj Sekcianoj.
- 18. de Oktobro 1911.** — Ĝenerala jara kunveno de la Sekcio. Tiu ĉi aliĝas rekte al la S. F. P. E., sola societo nacia en Francujo; la Sekcio fariĝas Esperantia entrepreno (U. E. A.).
- 13. de Aprilo 1912.** — S-ro de Coppet, prezidanto de la Sekcio, ĝin reprezentas kiel delegito dum la Kunveno Ĝenerala de la Delegitaro de la S. F. P. E. en Paris.



LA MONATO ESPERANTISTA

En *Le Monde Espérantiste*, S-ro Lamant publikigas artikolon, kies titolo estas : « Ĉu ni iros Krakovon ? » Jen lia konkludo :

« Se oni akceptas por niaj estontaj diskutoj ambaŭ⁽¹⁾ suprajn kondiĉojn, se oni garantias al ni plenan parol-liberecon, se per reciproka kaj ne plu unuflanka ĝentileco oni kreas paceman atmosferon ĉirkaŭ la venonta Kongreso, tiam, ni ne restos for, ni iros Krakovon kaj, per komuna interkonsento, la Oka estos nova glora triumfo de Esperanto. »

La Grupo de Limoges organizis feston sukcesplenan la 27-an de Januaro.

En Condé (Nord) du sindonemaj membroj de la Grupo tiun ĉi forlasas : Leŭtenanto Mannevy iras en Afrikon, kaj S-ro Gauthier iĝas direktoro de la liceo de St-Denis (Insulo Réunion).

En Bordeaux okazos dum Pasko la Kongreso de la Sud-Okcidenta Franca Federacio.


Eksterlande : en Gravenhage (Nederlando) estis fondata « Haga Esperantista Policgrupo ».

En Verona (Italujo), S-ro Privat parolis pri Esperanto en la Popola Universitato.

En Krakovo oni febre preparas la Okan Kongreson.

Nia lingvo pli kaj pli ĉiuloken enpenetras, kaj efikas la klopodoj de la senlaciaj, senbruemaj propagandistoj.

(1) T. e. : a) La decido pri kotizaĵo ne estos aplikata en Krakovo ;
b) La « rajtigataj delegitoj » mem balotos sian estraron.



LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝ-atakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

==== Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato. ====

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

Por fini, ni citos proponon de nia konata samideanino S-ino Marie Hankel, akceptitan de la Akademio :

*Konsilo pri enkonduko de novaj vortoj
en la komunan lingvon.*

« La Akademio, malaprobante energie la enkondukon en la komunan lingvon de superfluaĵoj, kaj per tio mem, nebonaj vortoj, atentigas la aŭtorojn de lernolibroj (vortaroj, gramatikoj, ekzercaroj) pri la danĝero de degenerado por nia lingvo, se ili arogas al si la rajton proponi aŭ eĉ uzi aŭ citi novajn vortojn, ne pravigitajn de la ĝenerala kutimo.

La Akademio sekve forte konsilas al la aŭtoroj de gramatikoj kaj ekzercaroj, ke en siaj libroj ili uzu nur tiujn vortojn, kiuj troviĝas en la Universala Vortaro aŭ en ĝia Oficiala Aldono.

Al la aŭtoroj de vortaroj, ĝi konsilas, ke ili sin konformu al la universala kutimo de la naciaj vortaristoj, laŭ kiu la verko pretendas kaj celas fidele prezenti la lingvon, kiel ĝi efektive estas kaj ne kiel la aŭtoro volas, ke ĝi estu.

Al la Esperantistaro, en kies mano nepre estas la sorto de nia lingvo, la Akademio konsilas, ke ĝi uzu kun la plej granda modereco sian povon enkonduki kaj, per uzo, aprobi novajn vortojn. Estas ĉies devo, antaŭ ol uzi novan vorton, zorge konstati, ke ĝi ne estas superflua, alivorte, ke ĝi ne estas anstataŭebla per taŭga vorto, ĉu fundamenta, ĉu almenaŭ tre ĝenerale uzata. »

Kun kia ĝojo ĉiu Fundamentisto legos tiujn vortojn; ĉu tiuj ĉi ne devus esti gravurigitaj orlitere en ĉiuj kunvenejoj esperantistaj ?

ROBERT BOLLACK.

KONTRAŭ
M A R -
MAL-
SANO

DELPHININE

De l' DOKTORO FLASSCHÆN.

KONTRAŭ
FERVOJ-
MAL-
SANETO

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : 10 fr. (4 S).

Aĉetebla ĉe S-ro WHITZ, 8, Rue de Duras, Paris
kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.

El miaj turismaj notoj (1905)

Mi estis jam vojaĝanta sur biciklo, tra montoj, de pli ol dek-kvar tagoj kaj alveninte en « Grenoble » (departemento Isère), mi haltis en tiu interesanta urbo por viziti ĝin. Post elporto de varmega somera tago, mi decidis forlasi, je la kvara posttagmeze, la suprenomitan urbon por ĝui pli grandan freŝecon per intima enpenetrado en la monto.

Plena je ĝojo, mi ekrajdis « Suzanjon » (tiel estis tiam baptita mia fidela biciklo), kaj ni foriris kiel du geamantoj, ne zorgante eĉ unu minuton, kie ni intencis ripozi dum la nokto, ĉar nur vagadi kune kaj solaj estis nia rapida deziro.

La kilometroj preterpasis unuj post la aliaj, kiel en sonĝo, kaj mi preskaŭ neniel bezonis apogi sur la pedalon: « Suzanjo » fordonis sin je la tuta forteco de ĝia objekta animo.

Mi preterpasis « Pont de Claix » kaj la riveron « Drac » ĉe l' nova ponto, kiu anstataŭas la malnovan, konstruita en plena arkajo, laŭ la maniero de azena dorso kaj estas konsiderata ankoraŭ nun, kiel unu el la sep mirindaĵoj en la « Dauphiné ». La rampo fariĝas pli kaj pli kruta, oni transpasas dufoje, sub grandega voj ponto, la fervojlinion de la Alpoj, oni resupreniras la valeton de la « Gresse », kiun oni superas je granda alteco. Dum tiu ĉi vojiro oni laŭlongas la fundamenton de la montaro de la « Moucherolle » kaj renkontas vidaĵojn ĉiam ŝanĝiĝantaj kaj plenaj je grandeco. Oni tiel atingas « le Monestier de Clermont » (900 metroj da altaĵo), longa strato kun rampo tre kruta. Estis la sepa kaj tempo por vespermanĝi. Mi haltis antaŭ la hotelo « Je la ora Leono », kaj petis, kiel ĉiam, senviandan manĝaĵon kaj puran akvon, kiel trinkaĵo.

Post vespermanĝo, mi sidis ekstere sur benkon, admirante la brutarojn revenantaj el la kampoj, sekvataj de altkreskaj paŝtistoj fajfantaj lokajn ariojn, ekrigardantaj kun envio la fenestrojn, kie troviĝis la belulinoj de la urbeto.

La luno lumiĝis, ludanta sur la supraĵoj de la ĉirkaŭantaj montegoj, aperigante la stelojn kiel diamantoj en la nokto. Mi ne povis ne cedi al la deziro veturi dum tia belega nokto, kaj je la granda surprizo de mia hotelmastrino

mi forlasis la vilaĝon je la naŭa vespere, uzante la lunbrilon kiel lanternon. La vojo altiĝis ĝis la intermonto de « Fau » (900 metroj), de kies supraĵo mi ĝuis mirindan vidaĵon, precipe dank' al tiel neordinara lunbrilo.

Sekvis deklivo de kvar kilometroj, iom impresiga, nokte, sur libermova rado, kun vojo serpenta meze de ŝtonegoj kaj turniĝoj sufiĉe danĝeraj.

Impreso granda, preskaŭ terura.

Post la vilaĝo « Les Clelles », kiun mi trapasis ne vidinte je tiu horo eĉ postsignon de vivo tra la tuta loĝantaro, mi resupreniris la vojon kondukante min per konstanta rampo ĝis la intermonto de « Lus-la-Croix Haute » (1177 metrojn da altaĵo). Sed estis skribite, kiel diras la Araboj, ke mi ne devis plenumi tian projekton, ĉar mi konstatis, kun ĉagreno, ke mia posta pneŭmatiko malŝveliĝis kun terura rapideco. Mi derajdis subite kaj ekpensis je mia neenviinda situacio. Mi troviĝis en la koro de la Alpoj, je 12 kilometroj de la vilaĝo « Les Clelles », kiun mi laste preterpasis, kaj je 13 kilometroj de la intermonto. Kia fatala afero !!

Estis tiam la dek-unua de la nokto. Super mi, la nigre blua ĉielo, sur kiu brilas granda stelo kaj multego da malgrandaj. Ĉie silento de morto kaj nedifinebla konscio de nepoveco.

Provi ripari mian pneŭmatikon kaj trovi la malgrandan boron tra kiu forbloviĝis la aero, estis afero tiel malfacila, meze de l' nokto, kiel trovi kudrilon en fojnfasko. Returni piede malantaŭen, dum 12 kilometroj, postulis almenaŭ du horojn kaj duonon. Mi ne sentis la kuraĝon fari ĝin. Iri piede antaŭen al la intermonto, dum 13 kilometroj, kaj ĉe ĝia supro trovi nenan helpon, ne estis afero tre kuraĝiĝanta.

Restis do al mi sola rimedo : min kuŝigi sur la bordo de l' vojo apud « Suzanjo » kaj por malhelpi ĝian malaperadon per krimaj manoj, mi enĉenis ĝian postan radon kune kun mia zono per penda seruro ; mi etendis min sur la dorson kaj provis ekdormi. La luno plendeme rigardis min per sia ronda vizaĝo. Silentigis la tuta naturo kaj la impreso de mia izoleco komencis akre persekuti min. Se mia kara edzino vidus min nun, certe ŝi subite svenus, sed, ĉar mi apartenas al la forta sekso, mi devis kuraĝe elporti tiun malagrablaĵon.

Dormo malleviĝas sur miajn brulumitajn okulojn ; mi kuŝas kun okuloj fermitaj, serĉante vane iom da dormo. Mi

estas tre limigita en miaj movoj, ĉar la ĉeno, kiu kunligas min kun « Suzanjo » estas tre mallonga. Subite, tra la silento de l' nokto, la dek-dua eksonas ĉe sonorilejo de ia malproksima vilaĝo kaj ĉiu ekbato frapas min en la bruston.... Poste, nova silento de tombo kaj fine mi sukcesis ekdormi.

Teruregaj sonĝoj transpasis antaŭ miaj okuloj kaj, meze de ili, mi eksentis kvazaŭ io tre malvarma moviĝis sur mia vizaĝo. Instinkte, mi pasis la manon sur la vizaĝon por forpeli la malagrablan sentaĵon ! sed, denove, post unu sekundo da intertempo, rekomenciĝis la sama impresio ; kompreneble, mi frapis min pli forte sur la vizaĝon kaj ekvekiĝis....

Sur mia vizaĝo, efektive, io malvarma kuŝiĝis ; mi prenis ĝin per la mano kaj vidis, ke estis... dika bufo, trankvile ripozanta sur mia frunto.

Certe, neniam plu en mia vivo mi resentos similan sentaĵon kaj eĉ al mia plej granda malamiko mi ne ĝin dezirus.

Mi saltegis sur la piedojn, tute forgesis, ke mi estis enĉenigita kun « Suzanjo » kaj karambolis flanken kun Suzanjo en la kruroj kaj la nigra bufo en la dekstra mano.... Mi kolerege deĉenis min kaj furioze dispremis mian tiranon sub la piedon....

Kompreneble, post tiela kruela vekigo, provi denove ekdormi estis por mi afero tute neebbla. Mi ĉiam eksentis sur mia frunto la malvarmegecon de tiu ĉi malvarmsanga besto ; aliparte, matenkrepusko komenciĝis kun malagrabla roso, kiu malsekigis min ĝis la ostoj.

Tuj kiam la matenlumo ĝin permesis, mi ekzamenis mian pneŭmatikon kaj post tre mallonga tempo mi trovis en ĝi najlon de hufferaĵo, kiu estis trapasinta la tri dikecojn de la kaŭĉuko. Pacience, mi riparigis tiun malfeliĉon kaj superrajdis « Suzanjon » por atingi la intermonton. La vojo inter pinoj kaj abioj serpente suriras la lastajn turnigojn kaj fine, mi troviĝis, je la kvina matene, ĉe la supraĵo de la intermonto (1177 metrojn). La sunleviĝo komenciĝas. Ĝiaj lumradioj fariĝas ĉiam pli kaj pli brilaj kaj sur la ĉielo ekaperas oritaj la supraĵoj de la montegoj.

Iom post iom malkovriĝas pli malproksimaj detaloj en la vasta pejzaĝo kaj fine sin levas sola kaj majesta, sur la ĉiela arkajo, la radiantata stelo de l' tago.

Kiel ĝoja ĝi lumas, en la pura monta aero de l' mateno !


Mi ĝuis longatempe tiun ensorĉitan lokon kaj kun bedaŭro malsupreniris la deklivon de 19 kilometroj, sur libermova rado, ĝis « Aspres sur Buech ».

Dum tiu ĉi vojirado, mi faris konkurson kun la torento, kiu fluegis, ŝaŭmanta kaj ruliĝanta, laŭlonge de la vojo.


Alveninte al la vilaĝo, Aspres, mi haltis por sekigi miajn vestojn kaj revarmigi mian internaĵon per varmega trinkaĵo. Kiam mi sentis min tute rebonigita, mi amuzis min rakontante al la hotelmastrino mian aventuron kaj parolante pri mia bufo, ŝi preskaŭ svenis, portante la manon al sia koro.

Ĉu vi ne kunkonsentas, karaj gelegantoj, ke vojaĝadi sur biciklo ĝuigas neatenditajn surprizojn ?

Henri de Coppet.



SENRIKA
CADENAS PARISIEN
SEN VINKTO KAJ SEN ĈARNIRO
SENRIKA



Ŝlosilo

Malfermita

GUSTA GRANDCO — FRANCA FABRIKADO

Tiuj seruroj, tute nikelumitaj, estas liverataj ankaŭ en bestoj po 12, kun malsimilaj ŝlosiloj.

Uzado de l'penda seruro

Por fermi la seruron, glitigi la cilindran parton sur la ringon, la fermo aŭtomate farigis. Por malfermi ĝin, enigi la ŝlosilon en la fendon, turni ĝin kaj tuj la cilindra parto glitas sur la ringon.

Por tiu artikolo, oni serĉas reprezentantojn kaj makleristojn, esperantistajn aŭ ne, por ĉiuj landoj.

Sin turni al

L. DESPRÉS ☆ U. E. A.
17, r. du Débarcadère, Paris

Videbla ĉe li ĉiutage,
je la dua posttagmezo

Telefono 536-30.

Tiu ĉi penda seruro estas tre ŝatata por ŝlosi la vojaĝkestojn, la vestkestojn el vime-no, kaj por enĉeni la biciklojn.

Prezo aŭ frankite: S 0,80
sendota per nacia
aŭ internacia poŝtmandato.



Vera
 Ferhava Salo
 alsimiligebla

ELTROVITA DE
 M. Maurice ROBIN
 en 1881.

LA
Fer Robin

mirinde efikas

KONTRAŬ

SENSANGECO,
 PALKOLORECO,
 SANGELFLUOJ
 ĈIUSPECAJ

Akcelas la nutradon kaj
 neniam mallaksigas.

Tiun ĉi kuracilon, absolute sengusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ce ĉiu mango, ĉu en iom da akvo aŭ vino. La enhavo de la boteto reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

Por eviti la falsajojn
POSTULU la **ROBIN**
 nomon de

VENDEJO POGRANDE:
13, Rue de Poissy, PARIS